

Sen lernolibro – ĉu vere preferinde?²



Esenca trajto de la Cseh-metodo estas la fakto, ke la kursanoj ne sekvas lernolibron. CSEH komencis instrui tiamaniere pro nura hazardo. Kiam li ricevis inviton instrui en Transilvanio mallonge post la Unua Mondmilito, lernolibroj estis tutsimple neaĉetebblaj. Tial li devis improvizi: li prezentis sin en Esperanto kaj invitis la lernantojn fari same, tiam li komencis indiki objektojn kaj diri iliajn nomojn en E-o.

Tiel naskiĝis la sistemo, kiun ni nun nomas la Cseh-metodo. Ĝi estis tiel sukcesa, verŝajne pro la personeco de CSEH mem, ke li neniam poste uzis lernolibron, sed ĉiam instruis nur per rekta metodo.

Por normala instruisto, al kiu eventuale mankas la brila personeco de CSEH, la manko de lernolibro portas plurajn malavantaĝojn.

1. La instruisto devas mem decidi, kiel prezenti ĉiun novan eron de la kurso: do praktike mem krei la tutan kursomaterialon.
2. La tuta leciono centriĝas ĉirkaŭ la instruisto, kiu restas ĉiam sursceneje, direktante, prezentante, aktorante, demandante, instigante, inspirante.
3. Se la instruisto volas prezenti liston, ekz. la nombrovortojn, la kolorojn, la monatojn, la tagojn de la semajno, ŝi/li devas skribi ĝin sur la tabulon, kaj poste atendi, dum ĉiuj kopias ĝin. Tio estas perdo de tempo kaj kunportas riskon, ke ne ĉiuj lernantoj transskribos senerare. (Kontraŭ tio eblas argumenti, ke dum la lernantoj pene kopias ekzemple la liston de la monatoj, ili samtempe komencas lerni tiujn vortojn.)
4. La lernantoj notas ĉiujn skribajn ekzemplojn en siajn kajerojn, sed finfine ne havas sisteman prezenton de la materialo. Se ili volas trovi ion, ili devas trafolumi sian kajeron, en kiu la materialo aperas sen indekso kaj sen aparta ordo.

² Prelego en Tago de la Lernejo en la 98a Universala Kongreso de Esperanto, Rejkjaviko, Islando, 2013

5. Se lernanto maltrafas lecionon, ŝi/li ne povas hejme legi la perditan materialon.

6. Pro la neceso ilustru ĉion mem, Cseh-instruistoj kutime trenas al la leciono amason da malgrandaj objektoj, kiuj utilas por ilustru la instruitan materialon.

7. Mankas ekzercoj por pli profunde trakti malfacilaĵojn, ekz. la akuzativon.

8. Ĉio estas prezentata per mallongaj frazoj. Mankas pli longaj legotekstoj.

Ĉiu medalo du flankojn posedas, kaj tiuj malavantaĝoj foje povas ankaŭ esti avantaĝoj. Tradiciaj lecionoj, en kiuj oni simple sekvas la tekstojn kaj ekzercojn en lernolibro, povas esti tede rutinaj. Per la Cseh-metodo, aliflanke, la horo de la leciono estas horo aktive spertata de la kursanoj, plena je surprizoj (ĉar ili ne povas antaŭvidi, kio sekvos), en kiu ili ne pasive ensorbis la materialon, sed konstante partoprenas.

Jam de la komenco aliaj instruistoj, kiuj volis instrui laŭ la sistemo de CSEH, sentis la bezonon pri lernolibro kaj legomaterialoj. En 1929 ili konvinkis lin eldoni sian kurson kiel gvidlibron por instruistoj. CSEH mem ĉiam insistis, ke tiu libro estas nur modelo, kaj ke la instruisto ne sklave sekvu ĝin, sed mem adaptu la materialon laŭbezone. En 1931 aperis ok legolibretoj kun la titolo *Konversacia literaturo*, kiu enhavis interalie plurajn kontribuojn de BAGHY. Kvankam la humuro kaj la ilustraĵoj fariĝis pli kaj pli eksdataj, tiuj libretoj estis reeldonitaj ĝis la fino de la sesdekaj jaroj.

Mi mem sekvis Cseh-seminaron gvidatan de Atilio ORELLANA ROJAS kaj la modelajn lecionojn de Graĵina OPULSKIENĖ dum la UK en Zagrebo en 2001. Tuj poste, mi komencis mem instrui laŭ la Cseh-metodo ĉe la Esperanto-grupo en Romo. Dum la seminario ĉe la UK, mi aĉetis la libron *Baza Cseh-kurso*, kiu malgraŭ kelkaj korektoj kaj modifetoj esence estas la kurslibro de CSEH eldonita en 1929. Mi tuj konstatis, ke kvankam tiu libro enhavas utilajn ideojn por instruisto, ĝi apenaŭ utilas por moderna kurso. Kiel ĉiuj Cseh-instruistoj, mi estis devigata tre zorge antaŭpretigi ĉiun lecionon, prenante ideojn el la libro, sed mem kreante mian materialon. Tio kompreneble estis tre temporaba afero, precipe dum mia unua jaro de instruado.

Dum postaj jaroj, mi komencis produkti pli kaj pli da materialo por akompani mian kurson. Mi mem faris kaj fotokopiis foliojn por disdoni al la lernantoj: koloroj, nombrovortoj, semajntagoj kaj monatoj, horloĝo kaj horoj, la familio, la korpo, vestoj, tabelo de la korelativoj, verbofinaĵoj, la akuzativo, sufiksoj ktp. (Multaj folioj estis amatore ilustritaj de mi mem, aŭ foje mi tondis ilustraĵojn el revuoj kaj simile.) Krome mi mem kreis ekzercojn kaj demandarojn, aŭ serĉis kaj fotokopiis ekzercojn el *edukado.net*. Jen tipa agado de Cseh-instruisto, necesa pro la manko de lernolibro por la kursanoj.

Kelkajn modifojn mi faris: precipe mi neniam uzas la sistemon de ĥora respondado, kiu estis tre ŝatata de CSEH. Li instruis dekojn aŭ foje eĉ centojn da homoj samtempe, do ne estis eblo pri unuopa respondado. Bedaŭrinde, en la roma grupo neniam ĉeestas tiom da lernantoj, do nenio malhelpas individuan demandadon kaj respondadon. Tio ebligas pli personan kaj interesan demandadon, ekz. „Kie vi loĝas?“, „Kiam estas via naskiĝtago?“, „Ĉu vi preferas vinon aŭ bieron?“, „Ĉu vi mangas viandon?“, „Kiel vi venas al la Esperanto-kurso?“ (ekz. aŭtobuse, piede ktp.), „Kiujn lingvojn vi parolas?“, „Kiun ĵurnalon vi legas?“, „Kion vi faris hieraŭ vespere?“, „Kiun filmon vi ŝatas?“, „Kien vi iros ĉi-somere?“ Foje mi instigas la lernantojn paroli unu pri la alia, ekz. „Kia estas la ĉemizo de Carla?“, „Kiaj estas la okuloj de Giorgio?“, „Kiu inter ni estas la plej alta?“ Tiaj demandoj estas tre ŝatataj de la lernantoj, ĉar ili parolas pri si mem kaj pri la aliaj homoj en la ĉambro. Tio evidente estas pli interesa kaj amuza ol demandoj pri la aventuroj de inventitaj roluloj en lernolibro.

Kiam aperis la libro de Stano MARĈEK *Esperanto per rekta metodo*, mi konstatis, ke tio estas perfekta akompanaĵo al la Cseh-kurso. Ĝi sekvas plimalpli la saman modelon, sed male ol la tradicia Cseh-kurso ĝi enhavas ekzercojn kaj pli longajn legaĵojn. Krome, ĝi estas ilustrita, tiel ke la kompatinda instruisto ne plu estas devigata kuntreni sian valizon da grandaj libroj, malgrandaj skatoloj, verdaj pomoj, blankaj musoj ktp.

Aliflanke, mi intertempe sufiĉe enhejmiĝis en la Cseh-metodo por ne deziri labori rekte de la lernolibro. Anstataŭe mi prezentas la novan materialon per la tradicia metodo de demandado kaj respondado, kaj nur fine de la leciono rapide tralegas kun la kursanoj la koncernenan ĉapitron de la libro. Tiel la kursanoj ripetas kaj firmigas la ĵus lernitan materialon, kaj se iu maltrafas lecionon, ŝi/li povas legi ĝin hejme. Uzante tiun libron, mi devis

rearanĝi mian propran materialon laŭ la sama sinsekvo; ekzemple, ĉar en la tria ĉapitro aperas la demandoj **Kie?** kaj **Kia?** kaj la sufikso **mal-**, mi zorgas prezenti tiujn vortojn per la kutima Cseh-sistemo antaŭ ol legigi la ĉapitron.

Unu gravan ŝanĝon mi faris: En la unua ĉapitro estas prezentita la strukturo **Kio estas tio?** La tradicia Cseh-kurso tamen komenciĝas per **Kiu estas vi?** kaj daŭrigas per demandoj pri la profesioj de la ĉeestantoj. *Esperanto per rekta metodo* atingas demandojn kun **Kiu?** nur en la tria ĉapitro. Laŭ mi estas tre grave komenci per la kursanoj mem, ne per demandoj pri objektoj en la ĉambro. Tial mi restas ĉe la modelo de CSEH, komencante per la frazoj „*Mi estas Anna. Kiu estas vi?*” Tiel la kursanoj tuj prezentas sin, kaj poste mi invitas ilin diri ankaŭ sian profesion.

Antaŭ du jaroj nia grupo akiris projekciilon, kaj mi lernis fari prezentaĵojn per *PowerPoint*. Tiel malfermiĝis nova ĉapitro en mia E-instruado. Mi nun pretigas bildmaterialon, kiun mi uzas por prezenti la vortojn kaj strukturojn en la libro *Esperanto per rekta metodo*. Tio ne signifas, ke mi forlasis la Cseh-metodon, ĉar la bildoj kaj tekstoj estas traktataj per la tradicia sistemo de demandado kaj respondado. Post prezento de la lernomaterialo, ni kune rapide tralegas la ĉapitron en la lernolibro.

Tiu bildmaterialo ankoraŭ ne estas preta por transdono al aliaj instruistoj, sed dum la lernojaro 2013-14 mi planas plibonigi la prezentaĵojn, tiel ke mi espereble povos dum la daŭro de la jaro iom post iom disponigi ilin al aliaj instruistoj pere de *edukado.net*.

Anna LÖWENSTEIN (Italio), anna.lowenstein@esperanto.org